Abstract - *This paper shows that:*

1) ***Physical Average Product*** *(PAP_{X1}) of the variable input X_1 in the cubic production function $Y = a X_1^2 - b X_1^3$ stays at its maximum physical value exactly at half path between the maximum of* ***Physical Marginal Product*** *(PMP_{X1}) and* ***Physical Total Product*** *(PTP_{X1}) functions.*

2) On the other hand, ***PMP_{X1}*** *maintains similar position relating to* ***Origin of the axes*** *and* ***maximum PTP_{X1}****. The first scholium was realized by the third and the fourth authors; the second scholium, by the fifth. Both were demonstrated by the first author. World wide used books are not observing these rules (Mnemonic rule: 1) M-A-T; 2) O-M-T).*

Key-words *– Neoclassical/Marginalist Production Economics – Relevant points on cubic production function.*

Literaturo

1. EATON B.C. & EATON D.F. (1999). *"Microeconomia"*. Tradukita de *Cecília C. Bartalotti, São Paulo, Saraiva*; Traduko de la 3ª Eldono, 606 pp.
2. PINDYCK Robert S. & RUBINFELD Daniel L. (1998). *"Microeconomics"*. *Upper Saddle River, N. Jeersey, Prentice Hall, 4 th Ed.*, 726 pp.

Adreso de la aŭtoro(j)

Prof. Hilmar Ilton S. FERREIRA
C.P.205
45600-000 ITABUNA – BA
BRAZILO
<hilmar@uesc.br>

Pripersonaj informoj

1. Profesoro Asista, UESC, *Universidade Estadual de Santa Cruz, Ilhéus / Itabuna, Bahia*, Brazilo. Km 16, *Rodovia Ilhéus/Itabuna*. BR-45650-000 *Ilhéus* (BA), BRAZILO. MdAIS 1686, San Marino; UEA-FD: *Itabuna* (BA)

2. Esploristo CEPEC/CEPLAC, *Caixa Postal* 7, BR-45600-000 *Itabuna* (BA), BRAZILO – e-poŝto: *acaraujo@cepec.gov.br*

3. Administratisto – Eksstudento pri Mikroekonomiko ĉe UESC – *Ilhéus* (BA), BRAZILO

4. Studento pri lernobjekto CAE-058-Mikroekonomiko, UESC, 2ª Semestro 2000

La nocio de "la bela naturo" en la estetiko de klasikismo kaj la principo de imitado

Ljudmila MURSALIJEVA

La klasikismo kiel literaturmetodo formiĝis dum kelkaj jardekoj sub influo de estetikaj teorioj de antikveco (Aristotelo, Horacio) kaj precipe de italaj artistoj kaj teoriistoj, inter ili Trisino (1478-1558) kaj Skaligero (1484-1558).

Sed la konatiĝo kun la verkoj de antaŭaj artteoriistoj en Francio estis nur siaspeca instigo al la evoluo de la nacia kulturo. La plej konataj teoriistoj de la klasikismo en Francio estas *Chapelain* (1595-1674), abato *d'Aubignac* (1604-1676) kaj *Boileau* (1636-1711). En iliaj verkoj la klasikisma doktrino trovis sian plej kompletan esprimon.

La ĉefaj reguloj de klasikisma poetiko formiĝis sub influo de racionalismo, kutima por la antaŭa filozofia, scienca, politika kaj estetika pensmaniero de la komenco de la XVII-a jarcento. Dum la unua periodo de sia evoluo la klasikismo estis fruktodona artmetodo kaj respegulis la antaŭenirantan, progresivan ideologion de sia epoko. En tiu periodo formiĝas la filozofiaj sistemoj de *Descartes* (1596-1650) kaj de *Gassendi* (1592-1655), kiuj liberigis la homan menson de mezepoka sĥolastiko kaj forte influis la pensmanieron de siaj samtempuloj.

La klasikuloj kredis, ke la racio estas ne nur propreco de iliaj epoko kaj socio, sed ĝi estas universala kaj apartenas al ĉiuj grandaj homoj kaj epokoj. Surbaze de la universala racio ili ellaboris la teorion de literaturo kaj arto. **"La racio difinas la socian mision de verkisto, problemojn kaj metodojn de verkado kaj eĉ la nocion de beleco. Tiuj reguloj kaj leĝoj ne dependas de individuaj gustoj, ili estas universalaj kaj nediskuteblaj"** (1).

La klasikistoj opiniis, ke la ĉefa tasko de arto estas kompreni la naturon, imiti ĝin. La naturo (interalie ankaŭ la homa naturo) restas eterna kaj neŝanĝebla, akceptante nur etajn eksterajn ŝanĝojn. La klasikistoj vidis idealan esprimon de la homaj naturo kaj racio en la ver-

koj de antikvaj verkistoj. La grandaj antikvaj poetoj estis por ili "**la modelo de racia poezio, instruistoj de racio, vivantaj en iu Kosmopolismo, sen iu ajn ligo kun lokaj moroj, ekstere de historio**" (2).

Ili volis studi la antikvecon kaj antaŭis la principon de imitado. Tiu principo malakceptis la imitadon sklavecan, blindan, formalan. Antaŭ ĉio ĝi instigis, pensi pri la sekretoj de la krea metodo de antikvaj aŭtoroj, pri la forto de ilia influo. La klasikistoj inspiriĝis de antikvaj aŭtoroj por krei verkojn pri aktualaj problemoj de sia epoko. Mallonge do, la klasikismo praktikis la principon de imitado de la antikvaj verkistoj kaj imitado de la naturo.

Estas grava principo de klasikisma estetiko: la principo de imitado de la naturo. Tiu principo asertas, ke la arto devas respeguli realan vivon, esti vereca. Kvankam tiu principo havis realisman orientiĝon, la klasikisma estetiko limigis ĝin, ligante ĝin kun la ideo pri socia utilo de arto, pri didaktiko, estetika gusto kaj dececo.

Laŭ klasikista doktrino ne ĉio en la naturo indas esti reprezentata en arto, ĉar ne ĉio "natura" estas digna kaj deca, do ili ne akceptis la naturon tia, kia ĝi estas. Kruda, neprilaborita naturo estis ŝanĝenda, por ke ĝi estu bela: nur la "bela naturo" dignas esti pentrata – ĉio hazarda malbeligas la naturon. En klasikista estetika doktrino regis do la principo de racio kaj la principo de gusto (3).

La celo de la arto estis "**proksimiĝi al la modeloj racie kreitaj. En ili estas la idealo de beleco. Ju pli proksimas la arto de la racie konstruita ideo, des pli ĝi estas vera, des pli bela**" (4). Oni konsideris, ke la vera modelo de arto estas nur tia naturo, kian eblas kompreni racie kaj kia konformiĝas al la racio. La fenomenoj krudaj, malbelaj, neraciaj estis konsideratаj kiel malveraj; la klasikistoj konsideris ilin kiel hazardaĵojn, esceptojn, maldignaj respeguliĝi en la arto. La teoriistoj de klasikismo volis respeguli en la arto nur la plej belajn kvalitojn de la homa naturo, ili serĉis ne tiom la veron, kiom versimilecon.

La abato *d'Aubignac* en sia libro "Praktiko de teatro" (1657) esprimis la ĝenerale akceptitan opinion: "**La vero ne povas esti fonto de teatra subjekto, ĉar ekzistas multaj veraj aĵoj, kiujn oni ne devas vidi... La poezio kaj aliaj artoj, bazataj sur imitado, devas sekvi ne la veron, sed ĝenerale akceptitajn ideojn kaj kutimajn homajn sentojn**" (5). Konata moralisto kaj artteoriisto *P. Nicole* (1625-1695) skribis 1650 en sia "Traktaĵo pri la vera beleco": "**Ne necesas juĝi pri la naturo, prenante ĝin tutan kaj plenan. Ekzistas falsa naturo kaj difektitaj racioj; necesas orientiĝi nur je la vera natureco kaj la sana racio, kiam vi volas kompreni la naturon**" (6).

Alia artteoriisto, *Le Bossu*, skribis en sia "Traktaĵo pri eposa poemo" (1675), ke en la naturo, same kiel en la homa karaktero, ekzistas la trajtoj ĉefaj kaj ankaŭ la duagradaj, akcesoraj, ŝanĝeblaj. "**Eblas neglekti akcesorajn trajtojn, sed ne la ĉefajn; bona poeto, same kiel bona pentristo, faros siajn personojn pli bonaj oli ili estas en la vivo**" (7).

Oni opiniis, ke la versimileco estas esenco de drama poemo. *Chapelain* evoluigas la saman ideon, esprimante la opinion de la Franca Akademio pri la tragedio "*Cid* " de *Corneille* (1606-1684): "**Ekzistas vero terura, kian necesas forpeli por la bono de la socio, aŭ, se ne eblas kaŝi ĝin, paroli pri ĝi kiel pri la fenomeno nenormala. En similaj okazoj la poeto rajtas preferi versimilecon al la vero, ĉar pli bone estas preni subjekton elpensitan, sed racian, ol la veran, sed ne korespondantan al la postuloj de la racio**" (8). *Chapelain* riproĉis al *Corneille* tion, ke li, restante fidela al la historia vero, falsigas la filinan naturon de *Himena*. Ŝi rifuzas venĝi pro la morto de sia patro kaj eĉ akceptas la geedziĝon kun lia murdisto. "**Tiuj pereigaj modeloj malbonigas la verkon, ĉar forkondukas ĝin de la ĉefa celo – socia utilo. Tio tute ne signifas, ke ne eblas fari utilan verkon, montrante malbonajn morojn, sed en tiu okazo necesas, ke en la fino ili estu punitaj, sed ne rekompencitaj, kiel en la verko de *Corneille***" (9).

La klasikistoj proklamas la konvenciecon de teatro – en la nomo de la Vero. Tio estis la ĉefa kontraŭdiro de la klasikisma estetiko.

En la tragedia ĝenro la teoriistoj de klasikismo vidis larĝan eblecon por montri noblajn sentojn kaj impetojn de la homa naturo. Pro tio ili multe interesiĝis pri la tragedio kaj alte pritaksis ĝin en la hierarĥio de ĝenroj. En la "Praktiko de teatro" abato *d'Aubignac* asertas, ke ĉe la reĝa kortego la spektantoj preferas la tragediojn al la komedioj, ĉar la tragedioj pritraktas gravajn politikajn, sociajn kaj ĝeneralajn humanecajn problemojn, sur la scenejo aperas noblaj, honestaj herooj. "**Sed la popolo, simplaj homoj, edukitaj en la koto, en malaltaj paroloj kaj sentoj, ĉiam preferas la krudan farson, ĉar ĝi mont-**

ras tion, kion ili mem kutimas diri kaj fari" (10). La klasikistoj opiniis, ke la ĉefa tasko de la komedio estas montri malnoblajn partojn de la homa naturo, ĝiajn mankojn kaj malvirtojn; pro tio la komedio estis konsiderata kiel malalta ĝenro, kaj la klasikistoj en siaj teorioj nemulte okupiĝis pri ĝi.

La klasikistoj-verkistoj havis moralan respondecon pro la efiko de siaj verkoj. Ili volis instrui al la homoj, ke necesas haltigi malaltajn strebojn kaj malsaĝajn sentojn kaj pasiojn, kaj obei al la sociaj normoj. La verkistoj devis sekvi la universalan racion ankaŭ en la politiko – la absolutismon, en kiu ili vidis racian kaj justan formon de la povo. **"Nur tiuj dramverkoj estas bonaj, kiujn eblas nomi lernejo por la popolo. La ĉefa regulo de teatraj verkoj postulas, ke la virtoj ĉiam venku kaj la malvirtoj ĉiam estu punataj"** – skribis *d'Aubignac* (11). Tiamaniere la alvoko pentri la naturon kaj la veron en la pritrakto de multaj verkistoj estis ofte limigita per la sfero de bono, belo, socio-utila kaj permesadis difekti historiajn faktojn por la dececo, socia moralo, gusto kaj versimileco.

Notoj

(1) *Razumovskaja M.V.: "Zametki o prirode jedinstva klassicizma", Vestnik LGU,* 1969, n-ro 8, p.80
(2) *Reizov B.G.: "U istokov romantičeskoj estetiki"* en: *Iz istorii jevropejskih literatur, Leningrad,* 1970, p.16
(3) *Zubert R.: "La critique classique et l'idée d'imitation", Revue d'histoire littéraire de la France,* 1971, n-ro 3, p.388
(4) *Razumovskaja M.V.: "Larošfuko – avtor maksmim", Leningrad,* 1971, p.127
(5) *Abbé d'Aubignac: "La pratique du théatre", Amsterdam,* 1715, p.66
(6) Citita laŭ *Bray: "La formation de la doctrine classique en France", Paris,* 1927, p.152
(8) *Chapelain: "Les Sentiments de l'Académie sur Cid"* en: *Literaturnyje manifesty zapadno-jevropejskih klassicistov, Moskva,* 1980, p.280
(9) Samloke: p.284
(10) *Abbé d'Aubignac: "La pratique du théatre", Amsterdam,* 1715, p.65
(11) *Abbé d'Aubignac: "La pratique du théatre", Amsterdam,* 1715, p.5

Adreso de la aŭtoro

D-rino MURSALIJEVA Ljudmila Ivanovna
u. Komarova 26, kv. 21
RUS – U f a – 450044 / RUSIO

Priaŭtora informo

S-ino *Mursalijeva* estas doktorino pri filologio kaj docentino ĉe Baŝkira Ŝtata Universitato, *Ufa*, Rusio.

Sanoaspektoj dum vojaĝoj en forajn landojn *)

Rüdiger SACHS

Enkonduko

Estas jam banala vero, ke vojaĝoj en forajn landojn (precipe en tropikajn regionojn) enhavas ne subtaksendajn malsanoriskojn. Ĉirkaŭ **duono de la vojaĝantoj** en tropikaj landoj spertas dum unumonata restado malsanoproblemon, sentas sin malsana aŭ devas preni medikamentojn.

Laŭ kongresa raporto de la Sekcio "Infekta kaj Tropika Medicino" de la Munĥena Universitato dum scienca konferenco je la 15a de majo 2002 (kiun partoprenis pli ol 600 kuracistoj, apotekistoj kaj medicina fakpersonaro) evidentiĝas, ke ĉ. 10% de la vojaĝantoj dumaŭ postvojaĝe konsultas kuraciston. El tiuj ĉ. 8 % devas resti malsane en lito, preskaŭ 3 % estas ne kapablaj labori post reveno el la ferioj. Laŭ diversaj statistikoj oni do povas taksi, ke ĉ. 300 el 100 000 vojaĝantoj en tropikajn landojn malsaniĝas, ke la nombro de "importitaj malsanoj" post eksterlanda restado kreskas, kaj ke minimume 50 germanoj mortas pojare dum aŭ post restado en tropikaj regionoj.

Same kiel antaŭ la Universala Kongreso de Esperanto (UK) 2002 en Brazilo kun la kadra programo de vojaĝo en Amazonion, ankaŭ antaŭ la venonta UK 2004 en Ĉinio kun ofertoj de dumkongresaj ekskursoj oni demandos sin pri eventualaj sanoriskoj. Nu, en tropikaj landoj kiel Afriko kaj Sudameriko gravas la "infektaj malsanoj", dum en Azio oni eble pli atentigu la "pernutraĵajn infektiĝojn" kaŭzatajn pro regionspecifaj kutimaj manĝoj el kruda fiŝaĵo kaj aliaj krudaĵoj.

Konata estas tuta vico de tiuspecaj infektiĝoj, sed ni parolu unue pri bazaj principoj por protekti la propran sanon dum vojaĝoj eksterlanden kaj fine ni aldonu certan, ĝenerale validan manĝodisciplinon rilate al la kuirmanieroj kaj -kutimoj en nekonataj landoj.

*) Prelego je la 21-a de septembro 2002 en Hanovro, Germanujo, laŭ invito de la Malaltsaksuja Landa Ligo de Esperanto.